

Ĉineske

(17)

e-Librigita de Elerno

aprilo 2015

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
55,75 silaboj kun duona rimo.

Lily

Morna vidvino

1.

**en granda domo
ŝi vivas sola
pasigas siajn tagojn
senkonsola**

**jen ŝi kuŝiĝas
sur sofo mola
jen paŝas tien reen
ja senparola**

2.

**ĉu pro impulso
ĉu pro aspiro
ŝi eksentas varmegon
de seks-deziro**

**ŝi ŝiras harojn
per daŭra tiro
turniĝadas sur lito**

kun peza spiro

3.

**mampintoj duras
malsekiĝas tru'
ŝi palpas, gratas, krias
kun freneza bru'**

**ŝi anhelante
en fortega sku'
kaptas siajn mampintojn
knedas ilin du**

4.

**per mano trema
palpas leĝere
ŝi la sukplenan subon
ekscite vere**

**ŝi ŝovis fingron
senbariere
en la truon kaj kirlas
ĝoje libere**

5.

**kia ekstazo!
dum memkonsolo
ŝi kolapsas sur lito
kun kora folo**

**la onanado
ŝajnas frivolo
fakte kontentigas ŝin
ja sen amoro**

Yanke

Koro en vento

**koro flirtadas
kiel fal-foli',
sed ne volas putriĝi
sur ter' – finstaci'**

**ĝi strebe flugas
jen kun ambici'
al la blua ĉielo
de bel-fantazi'**

**sed al ĝi mankas
forta energi'
pro mema pezo sinkas
senespere ĝi**

**malsupren falas
kun malhelpa kri'
en profundan abismon
ĝi ja sen konsci'**

Caisangzi

(Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

Sero

Trista floro

Deŝirita de l' tigo
la blanka flor'
kun kor-dolor'
lamentas en trista plor'.

Enŝovita en vazo
ĝi por dekor'
jam velketas
kun restanta bonodor'.

Changxiangsi

(Longa Sapiro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de
3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

Vejdo

Blanka lilio

**Sunradi'
de magi'
ĝenas dormon de lili'
en sonĝa ebri'.**

**Blanka stri'
larĝas pli
en floron de fantazi'
sur verda foli'.**

2014-01-09

Chaozhongcuo

(Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa
/ xxa,xa (x=senrima).

Vejdo

La suno en vintro

Tra vintra frosta aer'
la suno per aper'
sendas la varmetan
flueton al la ter'.

Ĝi invitas
logas homojn
al domekster'
por ĝui sunlumon
en brilplena oper'.

2014-01-20

Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Eĉino

Tri Fotoj

1.

Jen ĉambro
mamona
por riĉul' milionna.
Amasas bankbiletoj.
Ĉie ornamo mona.

2.

Jen fot' pri
danĝero.
Knabino sen espero.
Ŝi vokas sur fekabo:
"Tro altas la papero!"

3.

Jen foto
senpruda
pri la infano kruda.
Petole li rigardas
pugon de ino nuda.

2014-01-08

Vejdo

Pluvego en Julio

**abrupte
sen avert'
pluvgutoj per vipa lert'
draŝas la vojirantojn
je korpo kaj nuda vert'**

**la homoj
sub pelo
de la pluva anĝelo
fuĝas tien kaj tien
kurante en pelmelo**

**jen pluvo
subite
ĉesiĝas senhezite
akvo ankoraŭ gutas
de alte malrapide**

**elvenas
la suno
per sufok-arda kuno
bakas malsekan teron
kvazaŭ la venĝa puno**

**la homoj
kun ĝojrid'
post la vetera insid'
sub libera ĉielo
paŝas kun vesta humid'**

**ba, kapric'
vetera
ludas en fars' opera
per ĝia man' magia
homojn laŭ vol' libera**

Dianjiangchun

(Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj
respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo
xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Yanke

Frumatene

**Frumatene
revenas klara konsci'
kaj energi'
denove al mi.**

**Frumatene
jam da forto pli
pretiĝas
por korp-funkci'
kaj mensa raci'.**

Dielianhua

(Papilio Super Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

Yanke

Vana vojaĝo

**Jam li dronis en sufer'
longatempe,
ne plu per toler'
restadas kun konsider'
pri forlaso por prosper'.**

**Samas ĉie sur la ter'.
Ĉu li povus
fuĝi trans mizer'
per long-vojaĝa sever'?'
Ho ve, nur stulta ĥimer'.**

Dingfengbo

(Subigo de Ŝtormo)

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj
respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarnĝo
aabba/ccdeed

Guozhu

MIL AFIŜOJ

**Post la afiŝo mila —
penado malfacila.
Roboto ekzamenas.
Ĝenas
averto malĝentila.**

**Spit' al malbona veter',
danĝer',
kiu pruvas turmente,
ni marŝu al verdstelo,
celo,
obstine kaj senpente!**

Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa,xa (x=senrima)

Lily

Soife al amor'

**mi jam sub lia pasia kis-duŝ'
moliĝas
kun ovra buŝ'
anhele
ĝemkrie
per mana puŝ'
ĉirkaŭen
kvazaŭ batita muŝ'.**

**mi jen soife per surdorsa kuŝ'
atendas
nune kun guŝ'
krevita
sukplena
sen ajna fuĝ'
la kacon
por orgia kirl-fuŝ'.**

Fengrusong

(Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

Lily

Pretigu vin, kara!

1.

pretigu vin, la sinjor',
diru kun fervor'
al mi mielajn vortojn
ĉe l' orel'
per manlabor'
palpu miajn mamojn
por ekcita humor'

jam bategas mia kor'
dum ĉi tiu hor'
malsekiĝas mia pub'
duras jam mia klitor'
pretigu vin, kara,
por ekstaza amor'!

2.

mi soifas kun pasi'
je am-iluzi'
brakumu min tre stringe
jen sur min
per energi'
knedu mian karnon
ĝis erota ebri'

jam nun vin pretigu vi
preskaŭ sen konsci'
mi ja nereteneble
ĝoj-ĝemas en agoni'
enŝovu vin en min
por piŝtada seri'

Guizhixiang

(Aroma Laŭbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 4,
54, 64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Lily

Amludo en akvo

En sunradi'
mi iris naĝi

en lag' kun li.
Nudaj ni brakumis
nin kun pasi'.
Lia kac' erektiĝis
rigide
jen kontraŭ mi
je mia sub',
frotis min per
tikla magi'.

En soifa agoni'
mi lin algluis
jam kun ĝemkri'.
Li rekte enŝovis
kun am-mani'
la stangon en vaginon
profunde
kun puŝ-seri'.
Mi tordiĝis
elĉerpite
en ĝoj-ebri'.

Haoshijin

(Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x =
senrima)

Yanke

Reveno al hejmloko

1.

**Foje en jaro
al hejmloko reven'
pretas bonorde por
Novjara festen'.**

**Homoj veturas per trajn'
de svarma homplen',
spite kunpuŝiĝon
sen ajna ĉagren'.**

2.

**Hejma alvoko
spronas homojn al ir'
por rekuniĝo jen
de homa dezir'**

**Peniga vojaĝo ja
eble per korŝir'
muelas, sed ili
restas kun aspir'.**

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj,
laŭ rimaranĝo aab,ccb

Jadranka Miric (Serbujo)

Magazeno

**Bela magazeno
beno
komerca.
Per grandrabata vendo.
Mendo
apreca!**

Huanxisha

(Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po tri versoj de
sep silaboj laŭ rimaranĝo aaa / xaa (x=senrima)

Veĵdo

Vagabonda hundo

1.

sencele vagadas hund'
ĉu pro zorga malabund'
aŭ mastra batada rund'

mizere ĝi surstrate
evitas homojn kun grunt'
pro videbla krura vund'

2.

kie 'stas ĝia azil'
por ĝia viva facil'
kaj sane farta trankvil'

abomeninda mastro
ĉu li kun kora malbril'
pentas pri virta steril'

2014-01-21

Jiangnanchun

(Printempo Sude de Rivero)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Vejdo

Vojaĝe ĉirkaŭ Insulo Phuket*

**Briletas
mar-lazur'
en vasta spaco.
Ondetoj kun pur'
ruliĝas jen leĝere
jen saltetas kun plezur'.**

**La jakto
je rapid'
kuras antaŭen
plena je ĝojrid'
kaj tangas kaj balancas
kvazaŭ ĉevalo sen brid'.**

**Videblas
sur la blu'
nigraj punktetoj—
insuloj kun bru'
de naĝantoj sur plaĝo
ĉase ludantaj kun ĝu'.**

**Juninoj
en bikin'
krias kokete
je gapa fascin'
de viroj amavidaj
amsoifaj kun sangvin'.**

**Sur plaĝo
kuŝas jen
lacaj naĝantoj
aŭ svarm' en promen'
trankvilpaŝas senĝene
vere kun kora seren'.**

**Pelate
de vento
velŝipoj kuras
jen per frekvento
kvazaŭ blankaj numeroj
sur blua firmamento.**

**Rondŝvebas
la mevoj
ĉirkaŭ nia ŝip',
kvazaŭe revoj
niaj ondus muare
per mallevoj kaj levoj.**

**Smeralda
la gemo
alproksimiĝas—
verda poemo—
kovrita de arbustoj
l' insulo en bril-tremo.**

**Kvazaŭ songĥ'
blublua
la rondvojaĝo
animoskua
restos en nia memor'
kiel impres' plenĝua.**

21-09-2013

*situante sude de Tajlando, Insulo Phuket famas pro sia maraj pitoreskejoj.

Kuxiangsi

(Profunda Sopiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimarango a,xa,xa,xxa (x = senrima)

Catherine B. Krause

Vaporo

**Vaporas la tuta viv',
mankas al
ĝi signif',
eĉ sencelas
labora soif',
nihilpeno sen kvalif'
tristega
pro mistif'.**

Ne eblas senca deriv',
sensencas
la edif',
ne ekzistas
kiala specif',
sed sekventas direktiv'
ĉiela
sen modif'.

Eĉino

Al amikoj

**Jarkunven' asocia.
Prelego podia
pri Johano historia.
Bonfaro konscia.
Admiro konscia.**

**Pro respondoj al mia
poemo lekcia,
Amikojn dankas mi pia
kun sent'emocia,
kun kor' emocia.**

2013-12-24

Langtaosha

(Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Klaro kaj Brilo*

**Larmas mia kor’
ĉe tomb’, ĉu or’?
Fantom’ en pluv’ kun dolor’
penlaboris pro justo
en ĉiu hor’.**

**Tomb’ prez-altas por
la cindr-memor’.
Sub arbar’,herbej’ kun glor’,
al nova mond’ en akvo,
ĉu sanga plor’?**

2015-4-5

*Klaro kaj Brilo: Festo de Mortintoj, en kiu oni vizitas la tombojn
de mortintoj por ilin rememori.

Litingyan

(Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 6 versoj de 66,
76, 56 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

Viktoro

Damninda fumnebulo

Jen malalte pendas
svage griza vual’.
Ĉu fumo aŭ nebulo?
Ĉu polv-pluvo en fal’?
Jen malutilaĵ’
nevideblas en pal’.

La homaro faras
tion jen per fatal’
nocas sian vivon mem.
Ni per tokso-regal’
ja mortigos nin
per lasta festival’.

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
66,7,55 laŭ rimarangô xa,a,xa (x=senrima)

Lily

Sed masturbu vin, kara!

I.

**dum mia foresto
vi vivas amara
sed masturbu vin, kara
por malsoif' al
geiĝo para**

**dece konsolu vin
per ago ripara —
rimedo sanitara
lasu libidon
ludi senbara**

II.

**mia sola esper':
nepre ne ŝovu vin
en la truon de virin'
sekse malpura
por kaca uzin'**

**vi masturbu vin do
ne bridu per abstin'
la mano estas vagin'
frotu re kaj re
ja kvazaŭ en min**

Mantingfang (Aromo Plenas en Korto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj
respektive de 446,45,634,345/ 2,344,54,634,345 silaboj,
kun rimaranĝo de xxa,xa,xxa,xxa/ a,xxa,xa,xxa,xxa
(x=senrima).

Zhuang Qixiong

Gratulon al 30-jariĝo de JEA*

**Vi senlace
laboras kaj
semas en ĉiu hor'.
Amikeco--
eterna fervor'.
Feliĉo kaj paco
disfloras
kun bonodor'.
Ni ĉiuj
gajas kun vent'.**

pro Zamenhof-glor'.

**En kor'
fieris
kun sindono
de fajna or'.
Ni propagandu
tra spaca mor'.
Verku en E-o,
ĉinesku
por dia honor'.
Nia rond'
ĉiam brilos
pro bona aŭror'.**

**JEA: Jiansu-a Esperanto-Asocio de Ĉinujo*

Moyuer (Fiŝado)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
346, 76, 3, 37, 4, 545 / 36, 6, 76, 3, 37, 4, 545 silaboj,
laŭ rimaranĝo xxa,xa,a,xa,a,xxa / xa,a,xa,a,xa,a,xxa
(x=senrima)

Lily

Malvirgigo

**Admiras
min virgulo
sen aminduma spert'**

**mian seksallegecon,
flatadas min sen cert'
kun mallert'
intime
por sugestia ofert'.
Kiel disert'
por diboĉa ĝu'
li vendas sin al
mi per ĉasto-perd'.**

**Ha, bone!
Mi agu sen avert'.
Per nuda korpa svelt'
mi peze lin subpremas
siblas per kver-konĉert'.
Kia merd'!
lia kac'
maldikas kiel lacert'.
Per ekinsert'
mi tuj ŝovas ĝin
en min glite
ludas sen inert'.**

2014-01-08

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Catherine B. Krause (Nederlando)

Amikeco ne estas dieca

Ĉiu pradio,
laŭ sci' legenda
en Japani' konenda,
estiĝis kiel nedependa.

Ofte mi volas
mem unuopi,
izole mizantropi
por doloron animan ŝtopi.

Sed mi ne dias...
do kun konatoj
multopas en rilatoj,
unu ar' de homaj gefratoj.

Lily

Mia amata ĉevaleto

Jame senedza
mi vivas sola

por jaroj malmolkola
sed restas tede senkonsola.

Ofte suspiras
mi pri edzo-perd'.
Li amoradis kun lert'
kaj tre kontentigis min per spert'.

Li montris forton,
kun arda pasi',
per konstanta puŝ-seri'
ĵonglis per voluptema magi'.

Nun anstataŭ li
la kara gadmes'
venas al mia neces'
mi uzas ĝin ofte sen forges'.

Je erotiĝo
mi ekigas ĝin—
vere magia maŝin',
ĝi ŝpinas kaj vibras kun sangvin'.

Eterne dura,
neniam mola,
ĝi laboras firmvola
vera am-ludilo frivola.

**Jen ĝi tiklas
min ĉe l' klitorio
ĝis sukiĝas por boro
farota de plasta aktoro.**

**Mi ĝin enŝovas
vaginen glite,
Mi orgasmas subite
eligas ĝemkriojn ekscite.**

**Mi vere volas
pli da seksa ĝu',
tri fojojn orgie plu,
ĝis mi kolapsas sen eta bru'.**

**Ha, kia ludil'!
Sen ajna peto
ĝi atendas kun preto—
mia amata ĉevaleta.**

Niannujiao

(Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de
436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangô
xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Lily

Fiasko en amor'

I.

**En la lito
kuŝante
mi brulas de pasi'
ĉe lia flank'
alglue
al korpa dimensi'.
en mia mens'
kirle bolas
seksa fantazi'
jam prete por
erupta afekci'.**

**Mi etendas manon
knedas karese
kacon de li,
tamen mola**

**ĝi restas
sen erekta funkci’.
Mi ĝin suĉas
kaj lekas lange,
li kun anksi’
skuas kapon
sen ajna energi’.**

II.

**“Mi jam ne plu
atendi
povas, mia sinjor’!”
Bedaŭrinde
li diras:
“Mi vere kun fervor’
volus ege
vin enveni
per ekscita bor’,
mi bedaŭras
pri kaca senlabor’.”**

**Mi ankoraŭfoje
forte incitas
lin jen dum hor’,
sed maldura
ĝi restas
kiel velkinta flor’.
Vana peno**

ja min deprimas.
Kun kora plor'
mi renkontas
fiaskon en amor'.

Pozhenzi

(Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 5 versoj de
66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

Jadranka Miric (Serbujo)

Se vi dirus

Se vi, amatino
dirus nur, karulo,
ja, atendu, ekviŝu
larmojn en la spegulo
de la okulo.

Kverel' kaj miskompren'
foje okazita.
Subite okazinta
subite forigita.
Ja, forgesita.

Kulo kaj taŭro—pli da bruo ol faro

Sur herbejo kulo

**surdorsigis ĝue
al taŭro. Ĉu torei
aŭ esti reĝo plue?
Miris kul' brue.**

**Ĝi nenifaranta
enuigis ege.
Sed vento ekblovanta
forblovis ĝin forege
ja, tutbruege.**

Hundo kaj ĝia ombro

**Iun tagon hundo
kuris kun viandpec'
laŭ bela riverbordo.
Ravis ĝin riverbelec'
sed pli nova pec'.**

**De ĉi tiu hundo
estas pli granda pec'
malfermis ĝi la buŝon,
pro akrega avidec'.
Ve, al manĝeblec'!**

Moralinstruo— oni ne vidas kion oni havas, nur sklavas
al deziroj!

Leono kaj delfeno

(Malutila alianco)

**Ĉe marbordo bela
amikiĝis reĝoj,
la surtera kaj mara.
Konsilis pri la helpoj
en malfeliĉoj.**

**Al diablo! Taŭro
venkos min. Delfeno,
helpu min, kriis leon'.
Damna sort', vea peno.
Nia malbeno.**

*Se vi deziras sin protekti, trovu la aliancanon ne nur volan sed eblan helpi vin.

Beleco

**Beleco allogas.
Risko ĉiukaze.
Plukitaj peonioj
flaviĝas ekstervaze.
Kondiĉokaze.**

**Plukita juneco.
Posta ĉagreneco.
Fotoj de pasinteco**

karto por eterneco.
Se noblis eco.

Vejdo

Glaciaj skulptaĵoj

**Kvazaŭ faritaj de
la manoj de fein'
la figuroj el glaci'
flagre glimas en fascin'
en neĝa domin'.**

**Kristale travidaj
per ĉiz-tajla rafin'
ili ŝajnas vivdonaj
aspekte en halucin'
sub lamp-ilumin'.**

2014-01-14

Yanke

Disiĝo

1.

**Kiam en enamiĝ'
ili diris vere,
ke ili ja neniam
disiĝos laŭlibere
senkonsidere.**

**Sed jame disiĝis
ili malespere.
Kvinjara kunvivado
finiĝis degenerere
kvazaŭ ulcere.**

2.

**Li diris malpeze,
ke li vivas lace
kun ŝi en la sama dom',
lin tormentas agace
kuniĝ' senpace.**

**Ŝi korŝiron sentis
mordis lipojn ŝmace.
Ŝi jam pentis pri tio
kaj jesis ja aŭdace
miengrimace.**

3.

**Jes, ili disiĝis.
Ŝi kun larmofluo
levis sian kapon al
bela ĉiela bluo
sen plora bruo.**

Kun malplenaj manoj

li per paŝa skuo
perdis koramatinon
pro persista enuo
de am-detruo

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Mandio

Meditado en nubaro

Monton volvas nubaro
kvazaŭ en blanka maro.
Flosas montkapo
en ŝaŭm' de sapo;

svenis verdaĵo
sub pala gazo.
Pejzaĝo svagas,
homoj imagas.

Vejdo

Revizito al la Feina Monto

Jam en frua somero

**la bakanta vetero
per varmega ond'
regas super mond'.**

**Monto feina
altaĵ-domina
ŝirmas kontraŭ varm'
la homojn en svarm'.**

**Leviĝas friska vento
blove el oriento
susure sonas
varmeton donas.**

**La vivo viglas
sed homoj pigras.
kuŝado kun ĝu'
babil' sen enu'.**

**Nuboj sur la ĉielo
ŝvebas sub venta pelo
jen malrapide
jen tre senbride.**

**En ombro nuba
pejzaĝo suba
paradas per verd'
kun birda koncert'.**

**Atakas fresa aer’
naztruojn la homajn per
saniga efik’
al korpa fortik’.**

**La akvo pura
el font’ natura
sanigas korpon
forigas morbon.**

**Kia bela sukavat’*
jen kun favora klimat’
sen polva polu’
sen ĥaosa bru’!**

**Mi per la pilgrim’
kun kora estim’
ja al vi Fein’
kultas kun kapklin’.**

23-07-2014

*sukavato: Pura Lando laŭ budhismo.

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 13 versoj de
444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj laŭ
rimaranĝo xxa,xxxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxxa,xxa,xxa (x =
senrima)

Veĵdo

Responde al sinjoro Zhuang

**jes, la rondo
ekis paŝi
jam sen langvor’
sur la longa voj’
por esplori
por prifosi
ja kun fervor’
brilajn erojn
de beletra
la Esperanta trezor’
iomajn
tamen indaĵojn
de la valor’**

**per persista labor’
ni penu**

kun sincera kor'
do fosu sulkon
nian propran
kaj marŝadu
ja kun ignor'
al primokoj
al rikanoj
jen por nia verda glor'
senhalte
agu peneme
en ĉiu hor'

Zhuang Qixiong

Gratulon al Literatura E-rondo*

En tridek tri
koroj ĝermis
Verda aŭror'.
Pene laboru
en proza viv';
Sukcesu per
nobla fervor'.
En animo
fajretos trans
tempa kaj spaca memor'.
Sur ekran'
la fingroj penis
por bonodor'.

**E-evoluos per
granda plan'
kun justa valor'.
Ageme strebu
kaj praktiku;
Daŭre semu
pro gaja kor'.
Ŝipu kun Vi ,
al nova jar'.
Ĝojas tero pro favor'.
E-rondo
ĉiam resonos
en nia glor'.**

2014-1-1

Nankino

Shengshengman

(Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =
senrima)

Lily

Inter miaj femuroj

**Mia viro
jen karesas
je lia deziro
mian molan subon
por eniro
per siaj fingrumoj.
Mi ĝuas
kun ĝemdiro
“mi volas,
fiku min”
kvazaŭ en deliro.**

**Kun anhela spiro
disigas
li per puŝa tiro
miajn gambojn
por plua akiro.
Ja volupto venas.
Lia kac’—
karnrapiro
eniras
kun dolĉa eliksiro.**

Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

Catherine B. Krause (Nederlando)

Androgino

Vi
amas ideon de mi,
senseksa
kvazaŭ amfibi'.

Ĉu
okazas al vi la ĝu'
volante
fali al genu'

aŭ
ĉu vi simple volas naŭ
komplezojn
jen ĝis la morgaŭ'?

Min
ne amu stile de in',

**nek viro,
nur de Katerin'.**

La servanto

**ni
sub la supra energi'
ne scias
pri ekvilibri':**

**reĝ'
travivinta de la neĝ'
ne nepre
sidados en seĝ'**

**dum
stultulo kun oportun'
subite
mergiĝos el lum'**

**por
tranĉi kapon el la flor'
kreskinta
en komenca hor'.**

Eto

Vento en vintro

Vent'

**vintra en frosta ferment'
ekblovas
el la firmament'.**

**Son'
ulula per akra ton'
surdigas
en brua impon'.**

**Vip'
dura batas en disip'
malvarme
jen ĝis homa rip'.**

**Hom'
kaŝiĝas cede en dom'
kontraŭ ĝi
kvazaŭ frid-fantom'.**

**Ve,
homojn al cerba pane'
ĝi pelas
sen bona ide'.**

Lily

Embarasaĵo en avio

En

avi' kun brila seren'
mi kaj li
babilis sen ĝen'.

Du
novkonatoj jam en ĝu'
flirtadis
sen fluga enu'

Li
fole atakis min pli
permane
kun tikla mani'.

Eĉ
li palpis tra l' jupo-breĉ'
jam pubon
mian kun spir-streĉ'.

Jes
ankaŭ mi kun interes'
tordiĝis
sub lia agres'.

Sur
lian sinon kun murmur'
li lokis
min por aventur'.

Jam
mi brulis ja per seks-flam'
en korpo
pro portempa am'.

Mi
sentis kac-duron de li
jam pretan
por tuja funkci'.

Per
mano li kun maltener'
senigis
min je mov-liber'.

Je
ektir' mia kalsonet'
defalis
sen ajna pane'.

Sen
bru' li enŝovis sen pen'
la kacon
en min por festen'.

Nur
kac-kirliĝoj de plezur'

**kondukis
al ŝprucad' de ĉur'.**

**Ne
ĝemkriet' ĉe apoge'
aŭdiĝis
ĉar, absurde, ve!**

Fortika sed malforta

**Jam
la antaŭludo de am'
sufiĉas
por amora flam'.**

**Li
tordas sin kun ĝema kri',
fuŝpalpas
preskau sen raci'.**

**Pez'
de lia korpo per lez'
subpremas
min jen ĝis frenez'.**

**Per
mola man' mi kun tener'
avide
palpas kun esper'**

ĝis
lia erekta penis’
karese
per la fingra kis’.

Sed,
ho ve, je mia malkred’
ĝi mincas
kiel cigared’.

Kun
giganta korpo en brun’
fortikas
li vane jam nun.

Kok’
lia kiel salikok’
molkurbas
ja je mia ŝok’.

Tre
multe mi ĉe apoge’
suferas
pro lia pane’.

Jen
mi ĝemas kun kora splen’

**ba, vane
malgraŭ mia pen'.**

Sur herbejo

**Lun'
brilas super herbej-dun',
nin tentas
la herboj de jun'.**

**Vent'
friska el la orient'
ekblovas
je nia kontent'.**

**Ni
jam kisas nin kun pasi'
korplue
tute en ebri'.**

**Sub
atak' amsenta sen dub'
humidas
suke mia pub'.**

**Ĝem'
aŭdiĝas pro korpa trem'
komforte
ĉe vira ekprem'.**

Tir'
forta kuŝigas sen dir'
min dorsen
sur herbojn sen spir'.

Li
agas krude en mani'
langlekas
min kun softa kri'.

Jen
li palpas per man-promen'
jen knedas
mamojn de plenplen'.

Jam
mi molas pro seksa flam'
senforte
sur herba tatam'.

Nun
ni tute nudaj en kun'
tordiĝas
en stringa brakum'.

Kac'
erektas dure sen lac'

**simile
al krab-karapac'.**

**Suk'
mia kvazaŭ laŭ konduk'
fluetas
per tub' de kaŭĉuk'.**

**Flam'
volupta kiel cunam'
eksplodas
el muĝa dinam'.**

**Sur
mi pezas li en murmur'
kun kaco
en mi kun plezur'.**

**Kri'
laŭta ŝprucas en seri'
pro piŝtad'
mania de li.**

**Du
ni tuj kolapsas sen bru'
senmove
ankoraŭ kun ĝu'.**

For
ŝvebas ĝemkri' en amor'
en aer'
post pena labor'.

Vejdo

Bondeziroj ĉe Printempa Festo

Jen
la Novjaro de ĝojplen'
alvenas
kun salut' kaj ben'.

Jam
meritoj de tuta gam'
forpasis
kaj vanta akklam'.

Ne
kuŝu sur inta ide'
stagniga
malutila tre.

Plu
ekmarŝu sen ajna sku'
agu kun
pli da kontribu'.

**En
nova jaro ni kun pen'
pli granda
por verd-entrepren'.**

2014-01-30

Viktoro

Umefloroj sur monto

**Vent'
blovegas el firmament'
severe
per frosta turment'.**

**Jam
ekestas neĝ-panoram'
la tero
sub blanka tatam'.**

**Sed
umefloroj ja sen ced'
rezistas
kontraŭ gel-obsced'.**

**Ĉi-
sezone kun energi'
disfloras
ili per magi'.**

**Per
bonodoro kun fier'
allogas
kolora prosper'.**

**Sur
monto ili kun plezur'
ne timas
premon de natur'.**

Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 12 versoj de
67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ
rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=
senrima)

Lily

Stupro en hospitalo

**Mi sur malsanlito
kuŝis kun spirita blu'
deprimite
pro malordo
de la menstru'.
Kun okuloj
fermetitaj
sen ajna bru'**

**ginekologon
mi atendis
por kurac'
kaj instru'.**

**Ekis ekzamen' nu.
Io piŝtis
en mia tru'
kvazaŭ kaco
karnogluo.
Jen je eksku'
mi tuj trovis:
vira doktor'
kun likva flu'
ĵus eltiris ĝin
ridetante
pro seksa ĝu'.**

Siyuanren

(Sopiro al Fora Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvin versoj de
75, 445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimarangô
xa,xxa / a, a, xxa (x=senrima).

Vejdo

Funebre pri mia fratino

**Via mien' ankoraŭ
freŝe en memor'
mia restas,
viziiĝas
en imag' vapor'.**

**Via rido kun sonor'
sonas en ĉi hor'
jen ĉe oreloj
miaj klare
ja tuj en malfor'.**

**Hieraŭ ni babilis
varme kun fervor'
pri l' famili'
pri l' estontec'
laŭ sorta favor'**

**Sed nun vi jam iris for
sen disiĝa plor'.
Mi diru al vi:
mi gravuros
vin en mia kor'.**

21-09-2014

Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo
aaa / bb,aa

Vejdo

Dankon!

**Responde al s-ro Zhuang Qixiong
Dankon, kara sinjor’!
Sen langvor’
mi nur agas per verda labor’!**

**Nur por am’
ne por fam’,
sen honor’
mi persistas verki kun fervor’.**

2014-01-07

Zhuang Qixiong

Al Estimata S-ro Vejdo

**Bril-verk’ en via kor’,
Kia glor’!
Nur verda sent’ kun gaja ve-plor’.**

**Homa am'
gnoma lamp'.
Al aŭror'
antaŭen por pli bona honor'!**

2014-1-6

Nankino

Yexingchuan

(Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses versoj de
7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Mandio

En betona arbaro

**La urbo per cemento
kovritas.
Ĉu defendo
aŭ strangolo
jen dubigas
homojn sub tegmento.**

**Kun abomena sento
loĝantoj
per lamento
ade plendas**

**tutan tagon
kontraŭ l' dom-invento.**

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Jadranka Miric (Serbio)

Kiam venos maljuneco

**Pensiul'.
Kiel vi fartas?
Mi kiel bebo, kaj vi?
Ĉiu nokte mi kartas.
Oni min vartas..**

**Hajduko.
Plu kuraĝulo?
Mi, Serbo, kverko kora,
helpadis al povrulo .
Nun malfortulo.**

**Futuro?
Tempo espera.
Plu trovi la sanon.
Kvietigo severa.
Sento tenera.**

**Do, lukto.
Humana sen plor'.
Por senzorga mezoaĝ'.
Prevente kontraŭ dolor'.
Vivu juna kor'.**

**Maljunec'.
Paroloj en vent'.
Niveligi la klason
Kompreno kun bona sent'...
Ripozo sen pent'.**

Ankoraŭ unufojon

**Saluton!
Forta manpremo.
Perlas larmoj amaraj.
La arogantemo?
Aŭ laciĝemo ?**

**Adiau'.
Torento en kor'.
Hazarda renkontiĝo
kaj ne atendita plor'.
Peza la dolor'.**

**Iame,
Amo kiel pin'..
Ĝoja rido ligas nin.
Ni ne pensis pri la fin'.**

Ni tre amis nin.

**Vi kaj mi
Vigla ,gaja rid'.
Ondoj da kisoj al vi
pro nia unua vid'.
Al ies avid'.**

**Ve ,tempo.
pasas rapide .
Restis la vivo spuroj.
Moke aŭ iom ride
Jesu konfide.**

Mia kuzo esploranto

**Mia kuz'
tre akurate
venis al ni vespere.
Ni akceptis lin frate,
gaje korbate.**

**Ja, fraŭlo
li estas vera.
Bonhumora kun plaĉa
konduo ,tre surtera.
Foje mistera.**

Filipo,

agrabla junul'
sian genton esploras.
Adresis sin al fakul'.
Agema povrul'.

Serĉas li
stomako tente
el ampleksa medio,
la praulojn, atente.
Kun ni, konsente .

Zig-zago.
Tre malfacile.
Dume homoj perdiĝis.
Li serĉas vin mobile
kaj komputile.

Malserena sento

Fortulin'.
Oni diras nun
malantaŭ mia dorso.
Ŝi kore spitas al sun'
al sia aŭtun'.

Fortulin'
eĥadas vente.
Morna gepatra tombo.
Ekis pluvo ŝtormsente.

Larmojn prevente.

Fortulin’.

**Sur mutaj lipoj
rido kiel saluto
malgraŭ fiaj viv- vipoj.
Paliĝas lipoj.**

Fortulin’!

**Forta manpremo.
Dentoj grincas dolore.
Trista animploremo
kaj korpotrema.**

Fortulin’

**kun milda mien’!
La vivo atendas vin.
Al la gepatra bien’!
Nu, iru tien!**

Vivi de sia laboro

laboron!

**“lukro” serĉata.
Ve, reprotoondoj.
Krias buŝo malsata.
Konto blokata.**

Jen, krizo.

**Senlaboreco
kaj senutilaj penoj
naskiĝas ĉagreneco
kaj vanececo.**

Proleto.

Mediacio.

Pagi, ŝpari, monpuni.

Atakata racio.

Povra nacio.

**Socio
malbalanciĝas
mondskale kaj popolo
malforta unuiĝas.
Ni akordiĝas.**

**Okupu!
Kune vivtenu!
Laboru kun plezuro!
Ne festenu sed trenu!
Laboron benu!**

Foiro

**Foiro
la popola fest'.
La jara renkontiĝo.
Tradicia manifest'.
Kapo en tempest'.**

Karusel'
je infana ĝoj'.
La vivo sur kvarradoj...
Kun luno super la voj'.
Ja, al ĉiu ĝoj'!

Aŭtejo.
Brua konkuro.
Ludil' kiel premio.
Kurado al la turo,
ludoj per ŝnuro!

Jen, urso
ekster la domo.
Malantaŭ horordomo
la svingado ĝis vomo.
Ho, homo, homo!.

Bazaro.
Kaso malplena.
Malgraŭ tiom da homoj.
Sub tendo kantas lena.
Aŭdiĝas “/magda/lena”.

Miholja somero

Miholjtag'
aŭtuno bona.

**Subita veterŝanĝo
varma kaj pluvoplena
iĝis serena.**

**Ekflirtis
sekaj folioj
ventofunebra danco...
Falas teren folioj .
Putris tilioj.**

**Fontano,
jen, vaporiĝis.
La pluvgutoj ariĝis.
Surface tuj grandiĝis.
Brile ondiĝis.**

**Noktiĝis.
Birdopepado.
Aŭdiĝis altaj sonoj.
Kaj ĥorusa kantado.
Lunaperado.**

**Nova tag'.
Bluis ĉielo.
En bestokavo melo.
Ĉe ni, el plena kelo
dolĉa mielo...**

**Miholjtago laŭ ortodoksa kalendaro okazas ĉiam la 12an de oktobro — oni alnomis la tagojn ĝis 12a de oktobro miholja somero*

La lasta saluto

**Jovanka,
ja, vera rozo.
Nigrohara belulin’.
Batalanto sen pozo.
Nun en ripozo.**

**Luktanto,
ekde juneco.
Fortulino el Lika.
Kredis en humaneco
kaj diverseco.**

**Vi kaj Tito
kontraŭ faŝistoj.
Kaj misio alloga
vi iĝis pacforĝistoj,
socialistoj.**

**Slavaro!
Hej, jubilis vi,
iĝis jugoslavio.
“Unuiĝu. Venkos ni”.
Forgesis ili.**

**Alvenis
nova miljaro
venis tempo de ŝparo...
Adiaŭ inda paro!
De amikaro.**

Morto de kolombo

**Belega
kolomboparo.
Kunflugado tra nuboj.
Koncertoj kun birdaro.
Ĉiam en aro.**

**Feliĉa
kolombumado.
Sunbrilo en okuloj.
Floranta korkantado.
Dum flugsurfado..**

**Ĉielo
kiel senfino.
T trovi ruĝajn tegmentojn .
Neston fari por ino.
La kolombino.**

**Rendevu`
inter branĉaro.**

**Subita sunsubiĝo.
Surtere gvatis bestaro.
Ve, birda paro.**

**Ekfalo.
Bruoj kaj krioj.
Venko de migra kato .
Forflugis alten birdoj.
Malgajaj perdoj!**

Nelson Mandela

**Ne perdu,
homoj, esperon .
Ŝtatisto, batalanto,
forlasis la teron.
Versigu la veron .**

**Madiba.
Eterniĝis li.
Ne perdu la esperon.
Sudafriko ploras pli
ol ĉiuj ni.**

**Kunuu,
revenis li tie,
por esti enterigita.
Kunuu troviĝas kie?
En sudafriko, ie.**

**Arestej’
longtempa “domo”.
Longaj dudek ses jarojn.
Negro aŭ blanka homo?
Gravas nur homo.**

**Libero!
Festas anĝeloj.
Koro venkis mizeron.
Vivo kontraŭ rasistoj!
Vivu popoloj!**

p.s.

Nelson Mandela nasiĝis la 18an de julio 1918 kaj mortis la 5an de decembro 2013. Li estis la unua negra prezidento kiu post liberigo el malliberejo post 26 jarojn fariĝas politikisto kaj ŝtatiso. Liaj vortoj eterniĝis “estu laboro, pano, akvo kaj salo por ĉiu!” Ĉiu popolo devas flegi edukadon, batali kontraŭ segregacio kaj rasismo.

Zamenhof-Tago

**Espero,
ja, eliksiro
la internon lumigas.
Energia transiro.
Mensa rondiro.**

Do, vorto

parolfadeno.
Monde kunligas homojn
por pli bona kompreno.
Lingvo tra beno.

Esperant'
artefarita,
lingvo monde uzita,
de zamenhof kreita.
Cel' plenumita.

En lando
tre dezirata,
nome, esperantujo,
estas jam parolata,
lingvon, ŝatata.

Amikec'
internacia,
ponto al tradicia
kulturo. Sennacia.
Trudo nenia.

Novjara bondeziro

Estu vi
plenestimataj,
sincere tre amataj,

**kaj ege salutataj,
de mi, laŭdataj!**

**Ekpreĝu!
Tenu gajecon!
Al vi pacon kaj panon!
Flegu sennaciecon!
Kaj amikecon!**

**Nova jar'
rapide venos.
Multajn belajn donacojn
Sankta Klaŭs' disdividos.
Ĉiuj atendos .**

**Militon
evitu, certe.
Malbonaĵojn, konkrete.
Instru popolon lerte,
kaj ege sperte!**

**Nu, tostu!
Je via sano!
Al vi samideano!
Esperon al urbano
kaj vilaĝano!**

Sopiro

**Ekbrilos
jarŝanĝa festo
en ĉi solena nokto.
Belas pli nia nesto
ol ŝika vesto.**

**Ruĝa vin'
en glasoj plenaj,
makulita tablotuk'
kiel vangoj niaj, kaj
kisoj pasiaj.**

**Deziro
intimigas nin.
Ekis amoteksado .
Oni kaŝis sin
malantaŭ pin'.**

**Tintintis
murhorloĝo, ve
neniu aŭdis bruon.
Nek sonorilegon ĉe
la pordegon, ve!**

**Lunlumo.
Meznokte kun ni**

ekis piroteknikaĵ’.
“ĉe ni, same,” diris vi
ride pli kaj pli.

Memoroj

Pluveto
ĉi-nokte ,rara.
La memoroj vekigâs,
pri vojeto kampara
kaj foliara.

De post pluv’
mateniĝos sun’.
Ĉielo sereniĝos.
Vi diris,amo aŭ pun’,
kun vi aŭ malkun.

Forgeso
ja,estas kulpa.
Freŝe vivas la vortoj.
Ĵaluzo vere vulpa.
Tempo kunkulpa.

Rakonto
certe malgaja.
Provoka diafane.
Afero ruza , kaja.
Ja,tre malgaja.

**Pluvas plu.
Vundita koro .
Memorojn viŝas larmoj..
Saniga estas ploro.
Savo por koro.**

Al lernejkamaradino

**La lasta
saluto al vi.
Kolektiĝis amikoj.
Kor' ne povis elteni.
Ĉesis tiktaki.**

**Surprizo.
Doloro kaj plor'.
Vi akuŝis kaj flegis.
Ĝoigis vin ĉiu mor'.
Bona ina kor'.**

**Suferis
vi dum militoj.
Ne ĉiuj iĝis homoj.
Ja, multe da krimuloj.
Mankis estimoj.**

**Nenio
iĝis facila.**

**Via redonita domo
iĝis hela bonstila.
Je rigard', brila!**

**Ve, fino.
Nun ripozu, vi.
Senmorta estos memor'.
Belaj rozoj nur por vi.
Adiaŭ ĵiĵi.**

**La poemon mi dediĉis al mia lerneja kamaradino živka-žiži -ĵiĵi
radiojeviĉ -ubiparip, forpasinta la 27an de januaro 2014.*

Ne juĝu homon laŭ vesto

**Azeno
en leonvestaĵ'
aspekt' leona vera.
Ja, malbravas la estaĵ'
scias ĉirkaŭaĵ'.**

**Obstina,
kvankam ne fia..
Nur melodio ĝia
famiĝis. Fortas "ia"
la bleko ĝia.**

**Alvenis
ja, homoj mire.
Leon' ekster ĝangalo?**

Iuj ekfuĝis “vire”.
Sed, piedire.

Surprizo.
Azenoreloj.
La trompo malkovrita.
Kiel el verko perloj,
la fonten* fabloj.

La stango
kolerigita
ekbatis la friponon,
en la leon’ maskita.
Instru’ donita.

**Lafonteno: franca poeto kaj fablisto*

Leono, taŭroj kaj vulpine

Leono
observis tage
taŭrojn. Kiom da viand’!
Satmanĝos li senpage
idojn senage.

La taŭroj
vivis senzorge.
Ili kuniris ĉie.
Eĉ faris amprizorge
domon. Tutzorge.

**Unuec’!
Kia konkordo!
Disigu ilin, bestoj.
Ariĝu jen laŭ ordo.
Ĝis “en ordo”.**

**Ĝus venis
vulpino ruza.
Akceptis planon, fian..
Atakis ŝi konfuza
kaj tre ĵaluza.**

**Batalo
vea kaj kruela.
Por la taŭroj perdita.
Venkis trompo miela.
Kredo ĉapela.**

Moralinstruo

*Malharmonio ĉion neniigas. Fratoj laŭ kredo kaj kulturo
devas esti konkordaj aŭ oni ĵetas sin en abismon — en
leonobuŝon*

**adaptita fablo el kolektaĵo de la serba klerigisto kaj reformisto
Dositej Obradoviĉ (1742-1811)*

Ĉevalo kaj Lupo

**Jen lupo
maljuna, griza.**

**La vivo lernigis ĝin.
Viv' ĝia paradiza
ofte surpriza.**

**Ĉevalo
sur verda herbej'
trankvile paŝtanta sin.
Ekrimarkis lupon, hej!
Nova enfalej'!**

**Ĉevalo
ekkriis jene
dolorego terura..
Helpu min, ĉi-matene.
Henis ĝi pene.**

**Lignero
ĵus trapikis min.
Nu, dente, eltiru ĝin!
Tuj hufobat' sekvis sin
sur lupbuŝon. Fin'!**

**adaptita el la kolektaĵo de la serba reformisto Dositej Obradoviĉ
(1742-1811)*

Amikeco

**Mi tostu
al amikeco!
Fortiĝas ĝi pli kaj pli.**

**Je via bonintenco
kaj sincereco!**

**Retado
en virtuala
amika rondo bela,
kiel lulil' fabela.
En mond' kruela.**

**Interret'.
Mi ĵetas min kore.
Retumado intensa.
Laboru ni brilore
venku aŭrore!**

**Sincere,
kredo inter ni
iĝas amikeco ĉi
tre senbarila por ni .
Vivu harmoni'!**

**Memoru,
amikecon ni
ĉerpis el ĉiutagaĵ'
kaj el retmesaĝo ĉi
“kunlaboru ni!”**

Malbona sorto

**Jen, kokin'
bela grandkresta
klukanta en sia kort'.
La kuŝejo birdnesta
sen kok' foresta.**

**Hieno
pigra, malsata
ekvidis la kokinon
elfore. Mi malsata
ĝi jam kovata.**

**Deserto—
bonegaj ovoj.
Kokidaĵon por ventro
plena. Kun miaj povoj
al bonaj trovoj!**

**Hieno
ridis ĝojplena.
Dume tra herbej' sibilis
la serpento venena
kun plan' serena.**

**Subita
tondro fulmoporta**

krakadis surĉiele.
Fuĝis la bestokorta.
Jen, hien' morta.

Sovaĝa kaj hejma azeno

Perdiĝis
foje azeno.
Vagadis ĝi tre longe
antaŭ ĝia alveno
sur ĉi bieno.

Ho, azen'.
Similas al mi .
Tamen ĝi vivas riĉe .
Kia vileco al ĝi
sed trograseco!

Libero
feliĉo via!
Sovaĝejo allogas.
Ĉe vi zorgo nenia
nur, bleko ia.

Miskompren'.
Kial plend' ĝia?
Mankas pli da dankemo?
Kial malĝojo tia
en rigard' ĝia?

Nova tag'.
Azen' ŝarĝita .
Per bastono pelata,
sub ŝarĝo kurbiĝita.
Forte batita.!

*Moral instruo: ne ekzistas feliĉo konstruita sur
turmentado kaj humiligado !*

Akvomuelejo de morto

Legendo
diras, malbono
naskas nur remalbonon.
Sciigo pri demono
al ĉiu kono.

Sur Radan ,
en Bojnik valo ,
montara malbenita
sorĉmagia homfalo.
Frenezul' kalo.

Hajdukoj
mortigis homon,
honestan, diligentan.
Kaj forrabis la domon.
Faro de demon'.

Magia
fantoma loko.
Ĝin ŝafaro evitas. .
Sur bela Radan roko
kriaĉa voko.

**laŭ la legendo pri malbenita akvomuelejo troviĝanta sur
montaro Radan , en la valo de Pusta Reka (dezerta rivero)*

Inunda katastrofo

Inundoj.
Ekis terglitoj
post la longdaŭraj pluvoj.
Ho, subakviĝis litoj.
Homoj kaj vitoj.

Lecion’
ja, ege ŝoka.
Ne nur tera sed kosma.
Tutslava krizo, moka.
Enigmo roka.

Atesto
terura, peka.
Forgesitaj bonecoj.
Amrivero tre seka.
Senfrukta, peka.

Lumturo

ekbrilis fine.
Sunleviĝo tra ŝlimo
elakviĝis ni pine,
senlimdifine.

Konkordo!
Interpaciĝo.
Akriĝinta konscio.
Por mensa trankvliĝo .
Kaj korp' saniĝo.

**dediĉita al la loĝantaro de inunditaj regionoj de serbio,
Respubliko Serbska en Bosnio kun federacio de muzulmanoj kaj
kroatoj kaj al la loĝantaro de kroaŭjo. Eĉ en malbono oni povas
trovi ion bonan!*

Gaja kanto

Muziko,
vinokoloro
ebriigas animon.
Tre ĝojas mia koro
pro bonhumoro.

Papili'
tuŝo tenera.
Jen kuniĝo miela.
Ĉi rakonto somera
amfloro vera.

**Aŭroro.
Ĝojo al natur'.
Matene kelkatempe
post vizito al tur'
plaĉas ŝipvetur'.**

**Mistralo.
Kvietas maro.
Velŝipo moviĝanta
kajfluganta birdaro.
Blanka mevaro.**

**Ŝipspuro
sur horizonto,
kiu jam punktiĝis.
Kiel fumo el pipo
aŭ imag' vipo.**

Reta vojaĝo

**Ĝuo dum
somerferio.
Neforgesebla afer'.
Reta vojaĝ' al rio.
Ĝoja ekkrio.**

**Post tiu,
sekva semajno
pasis melankolie.**

**Vojaĝ' per reta trajno
jen, nova gajno.**

**De lumurb'
trans oceanon
survoje al ĉinio
ĉiuj bezonas panon
kaj savo-manon!**

**Reveno
al ĉiutagec'.
Vekiĝas emocioj.
Ve,tias retamikec'
sen ci amarec'.**

**Dankon al
retamikaro.
Mondo eniris domon.
Pro ambaŭa bonfaro
ĝojas anaro!**

Aŭtuno

**Aŭtuno
alvenis pene,
honte tra branĉaro,
kisante teron bene,
kaj herbojn ene.**

Malbono
ekis pluvduŝe.
Herbejoj ŝlimoplenas,
rompis sentuŝe
kuŝis ventpuŝe.

Surprizo
forme de neĝo
sur Kopaonik monto.
Naturŝanĝo sen preĝo
indas Terleĝo.

Subita
vento susuro.
Putranta foliaro
amasiĝas ĉe muro.
Lumbrikospuro.

Nubeto
vente blovita.
Zefire ornamita
kaŝado nefinita
de sun' bakita.

Infanaj friponaĵoj

Infanoj
ridas okule,
per larĝa rido sendas

**sunsalutojn etule,
de lipangule.**

**Biskvitojn
vi ĉi-matene
po du en buŝon metis
ambaŭmane, ĉi jene.
Finmaĉis pene.**

**Fripone
ekridetis vi
pro mia troa timo .
Nu gustumu, pajo, vi!
Ja, ĵus knedis mi.**

**Hieraŭ
mi serĉis vane
la kajeron helbluan.
Flustris vi, ridosane
Mi? Propra mane?**

**Hundido
venis donace.
Estis ĝi tre ŝatata.
Ve, forkuris ĝi pace,
Ploris vi lace.**

Aŭtuna elegio

**Folioj
lulantaj vente
falas de sur branĉaro.
Preĝas mi duonsente
emoci-pente.**

**Kuŝejo
kruda betona.
Ŝanĝiĝas jarsezono.
La influo persona.
Ĝojo duona.**

**Migrado
de birdoj suden.
Klara aŭtuna bildo.
Vibras sonoj aeren
trans hemisferen!**

**Mirindaj
bildoj de kampoj .
Flavobrunaj pejzaĝoj
sur la montopaŝtejoj
kaj plataj valoj.**

**Dum nudas
arboj , putranta**

**estas foliaro.Nur
Luno mutas brilanta
vigle vaganta.**

Resaniĝo

**Nek jaroj
nek longaj tagoj
pasis rapide, kara.
Gravas komunaj agoj.
Propras reagoj.**

**Ĝis revid'!
Vivu amikec'!
Homon oni estimas
pro solidarec'
kaj bonkorec'.**

**Bela vort'!
Aŭdiĝas ploroj
pro vekigintaj koroj.
Koloriĝas taghoroj
pro bonhumoroj.**

**Nova fort'
de amosuport'.
Ĉielo blue klaras.
Ĝoja pepado el kort'
kontraŭ nigra sort'.**

**Espero
kiel lulkanto
milde karesas koron...
Vivu resaniĝanto!
kara amanto!**

Vivoleciono

**Venteto
milda kareso,
sekretas je oreloj.
Aŭtomata permeso.
Fajna promeso.**

**Parolo
pense dirita,
konversaci' lakena,
pro vorto kovrita.
kredo perdita.**

**Paroli
ĉu kun flameco
aŭ impete murmuri.
Nur gravegas boneco
kaj bonintenco.**

**Perfido
Antaŭ la lango**

**eklaboru la cerbo.
Klaĉo buĉas sen sango.
Frapo de l' vango.**

**Diri nen
al ĉio duba.
Restu fidela amik'.
Fortuno iam nuba
ŝanĝo tre kruda.**

Esperanto-Tago

**Espero
jes, tute certa.
La afer' marŝas bote
de sepmejoj per lerta,
mesaĝo sperta.**

**Instrui
alpaŝi rekte
al lingva edukado.
Do, ekagu afekte
sed tre korekte.**

**Senfina
lukto. Praktika
lingvo uzado. Eblec'
por harmonio psika.
Studo efika.**

**Mirinda
estas Esperant’.
Ĝia internaciec’
Lingva paco batalant’
Nia flama kant’...**

**Ĝi semas
amon fratece
kontraŭ Apokalipso.
Ni agu bonintence
kaj amikece.**

Gaja printempa festo

**Ĉi jaro
estas la ĉina
printempa ŝafojaro.
Brilo de urbo pekina
sur arbo pina.**

**Feliĉo,
ĝojo surstrate
vivaj muzikaj bandoj.
Oni dancas korbate
ritmon laŭdate.**

**Ruĝiĝas
flirtantaj flagoj.**

**Koloroj favorataj.
Ban Ki-Moon-a reago
al “festo-ago”.**

**La drakoj
multkoloritaj
vigle ondiĝas sub
balonoj plenigitaj
kaj kunligitaj.**

**Nova jar’,
printempa festo
diskonigas kulturon.
Elpelita el la kesto
“ŝafa tempesto”.**

**Al miaj ĉinaj geamikoj elkorajn bondeziroj el Serbio
PROGRESON KAJ PACON EN LA KURANTA 2015 JARO —LA
JARO DE ŜAFO.*

Homoj vekigu, donu ŝancon al paco

**Perdita
generacio.
Ĉu eblas tio? Ĉio
dependas de racio,
kaj mem konscio.**

**Ĉi vintra
sezon’ mortonta.**

**Agonias popolo.
Ve, krizo ne solvonta.
Paco sonĝonta.**

**Sindono.
Ve, solidarec'.
Kredo en vivobelec'.
Homa ,sankta liberec'
Homa amikec'.**

**Pistola
demokratio.
Faŝisma sintrompado,
longdaŭra apatio.
Pigra opio.**

**Degrado
de homaj rajtoj.
Debuto de novuloj.
Refrakapas debatoj.
Krioj de pentoj.**

Mirinda amparo

**Milito
forprenas amon.
Dispartigas amikojn.
Glorigas fi-proponon
donas fi-samon.**

**Similaj
trovas sin
en diversa ĉirkaŭaj'
eĉ en fi diabla sin'
por apogi sin.**

**Kontraŭe
amo lumigas
homon intere milde,
vigle vin revivigas.,
vin perfektigas.**

**Julia,
Ismiĉ Admira
kaj Boŝko Brkiĉ, fama
paro,pro amo mira.
Amo Admira!**

**Ilia
peko estis am'
dum aliaj militis.
Ilin mortigis pro am'.
Sennacia am'.**

*La poemo estis dediĉita al la "sarajeva Romeo kaj Julia" al serbo
Boŝko Brkiĉ kaj muzulmanino Admira Ismiĉ loĝantaj en BiH kiuj
provis fuĝi de snajpera paŝilo.*

*Ilian longjaran amon mortigis /1993/ tiuj kiuj forgesis la vorton –
Amo.*

Lily

Sopire al mia amato

okaze de Valentena Tago 2015

**Al amat'
mia intima
mi sopiras ĉihore,
freneze ventanima
kun sent' deprima.**

**Li perdis
ampovon nun jam
pro aŭta akcidento
kvazaŭ mortinta dinam'
sen ardanta flam'.**

**En memor'
mia lastjare
en ĉi tag' ni amludis
enlite temerare,
familiare.**

**Murmure
sur korpo mia
li diris: "Mi ja volas."
Li ekagis pasia
kun ĝemo kria.**

**Li lekis
kaj kisadis min
de supraĵ korpopartoj
manie kun kapoklin’
ĝis mia vagin’.**

**Mi ĝemis
tordiĝe forte
sub lia premo peza
mi movis min risorte
ĝuis komforte.**

**Post amor’
li kun ĝojoplen’
diris: “Donacon al vi
dum Tago de Valentin’.”
Jen lia fest-ben’.**

**Sed nune
mi nur komplate
karezas lin moroze
jen kun larmoj private
gutantaj ade.**

2015-2-14

Vejdo

Tristo de birdoj

**Sur ĉiel’
flugas birda ar’
migre de frosta nordo
por travintra nestprepar’
en suda arbar’.**

**Renkonte
nigreca nebul’
ilin trafas subite
kiel omena gratul’
en aera lul’.**

**Barakte
kun energio
ili elsturmas fine
tra fuma emisio
de industrio.**

**Pli foren
por komforta lok’
ili flugas per serĉo,
sed ĉe inta nesta rok’
jam staras domblok’.**

**La rojo
kun akvo pura
plenas je nigraj fluoj.
Ne plu trinakv' sekura
Nek viv' plezura.**

**La kopso
malaperis jen
pro urba domkonstruad'
je ilia trista splen'—
kora malseren'.**

**Konstrui
neston sur tegment'
ne konvenas nek taŭgas
pro maliceta frenkvent'
de buba taĉment'.**

**Kie do
ilia nesto
devas kuŝi trankvile
sekure en kunesto
kontraŭ infesto?**

Ruĝa ĉapeleto

(germana fabelo)

**Antaŭe
vivis knabino**

**obeema kaj saĝa
kun kara aminklino
jen al l' avino.**

**L' avinjo
per ruĝa velur'
trikis belan ĉapelon
por sia nevino nur
je ŝia plezur'.**

**De tiam
la knabin' ne plu
surportis la ĉapelojn
aliajn kun ajna ĝu'
krom tiu ĉi nu.**

**Oni do
alinomis ŝin
la "ruĝa ĉapeleto",
kara nom' por la knabin'
kaj amo sen fin'.**

**Patrino
al ŝi tenere
iutage ordonis,
"Kara, avinj' sufero
malsanas vere,**

**vizitu
ŝin ja konsole
jen kun kukoj kaj vino.
Ŝi vivadas izole
sed malmolkole.”**

**Ankaŭ ŝi
diris averte:
“Lup’ troviĝas arbare.
Vin gardu sen-inerte
evitu lerte.”**

**Arbare
lupon hazarde
la knabino renkontis.
Ŝi ne konis rigarde
ĝin, jam sengarde.**

**Salutis
Ĝi ŝin intime:
“Bonan matenon, kara!
Kien iri sentime?
Ĉu malproksime?”**

**Respondo
venis rapide:
“Mi iras al avinjo.
Morb’ ŝin kaptas inside**

kaj tre perfide.”

La lupo

ĉuis raŭksone:

“Kio estas en la korb’?”

Kukoj faritaj bone

de panj’ sindone?”

La knabin’

diris fiere:

“Jes ja, kukoj kaj vino

por avinjo sincere!

Vi pravas vere.”

“Do kie

ŝi loĝas nune?”

Lupo demandis ruze,

“Se estas oportune.

ni iru kune.”

Ĝin trafis

ide’ alia:

“Mi iros antaŭ l’ knabin’

por ŝajnigi min pia

avinjo ŝia,

tiel ke

mi manĝos ĝue

la etulinon ĉarman.
Do mi iru pli frue,
agu senbrue.”

Ĝi frapis
je l' pordo forte.
“Kiu?” ĉuis l' avino,
“Mi kuŝas malkomforte.
Enen tra-korte!”

Post enir'
ĝi manĝis per vor'
la oldulinon tute,
enlitiĝis kun fi-vol',
kiel avin-rol'.

Alvenis
knabin' senĝene.
Ŝi tra nefermita pord'
eniris ĝojmiene
kun korb' manprene.

“Saluton,
avinjo kara!
Kiel malsano statas?”
Sonis voĉ' familiara
kaj vere klara.

**La lupo
salutis ĝeme,
kvazaŭ olda malsanul',
zumis ion subpreme
trakorpe treme.**

**“Avinjo,
kial havas vi
tiel grandajn okulojn
kun verd-glimanta radi'
kiel arb-foli'?”**

**“Por bone
vidi vin klare!”
“Kial kun orelegoj?”
“Por aŭdi vin senbare
kaj senerare!”**

**“Do kial
longajn brakojn vi
havas, kara avinjo?”
“Volas brakumi vin mi
jen kun energi'.”**

**“Kaj buŝo
tiel granda, nu,
pro kio do, avinjo?”
“Por formanĝi vin kun ĝu’**

tute sen sang-flu'!"

**Dirinte,
la lup' el la lit'
saltis kaj formanĝis ŝin.
Ĝi rekuŝiĝis per glit'
ĝoja pro l' merit'.**

**Ĉasisto
tie nefore
alvenis al la domo
por saluti ĉihore
avinon kore.**

**La lupon
li vidis ene
en ŝia lit' kuŝanta,
ĉion eksciis plene,
ekpensis jene:**

**se mi ĝin
pafos en malord',
mi vundos l' oldulinon
en ĝi, eble eĉ ĝis mort'
per malbona sort';**

**se mi ĝin
distranĉos tute,**

**mi elsavos ŝin viva
kaj forigos ĝin lude
nur triminute.**

**Dirite,
farite. L' knabin'
kaj avino saviĝis.
Ĉiuj kore dankis lin
kaj laŭdis sen fin'.**

**Nu, knabin',
estu en singard'
post mizera lecion',
pene pensu antaŭ salt'
por pli bona fart'.**

Spektado al kolzofloroj

**Junie
En varma sunlum'
zefiro tiklas blove
kiel birda minca plum'
nin per milda rum'.**

**Sin sternas
vasta mar' en orkolor'
ondanta ĝis senlime —
bela natura dekor'
jen kun bonodor'.**

Abeloj
flirtas zumsone
dancante inter florar'
por poleno bezone
nu, ĉisezone.

Ĉielo
hele lazura
kontrastas kun orflavo
en ventpelo susura
kun sent' plezura.

Homoj ja
vagas libere
sur kolzaj kamporandoj
por spektadi senpere
ĉi-eksomere.

Ebrias
koroj de homar',
ĉu pro natura belo
aŭ pro miela nektar'
aŭ pro flava mar'?

Korvo kaj vulpo

Ricevis
korvo ĝojplene

**fromaĝpecon de l' Dio,
flugis kun ĝi buŝtene
al arb' serene.**

**Jen vulpo
kuris pretere.
La fromaĝa bonodor'
alblovis ventlivere,
tentis lin vere.**

**La vulpo
gapis avide
al la korvo sur arbo.
Li jam naskis inside
planon decide.**

**Ruzeme
li al la abi'
iris kaj svingis voston
kun ŝajniga emoci'—
sed, fakte envi'.**

**La vulpo
diris miele:
“Kara trezoro, vere
vi ja aspektas bele
ŝajne anĝele.**

**Vi havas
staturon belan,
mirindan okulparon,
kaj plumaron fabelan
ja blanke helan.**

**Vi certe
pepas arie.
Kantu, kara fratino,
tuj kantu melodie,
kantu pasie.”**

**La korvo,
multe sorçite
de la mielaj vortoj,
malfermis senhezite
buŝon kvivite.**

**Pum! Falas
teren la fromaĝ’.
La vulpo tuj buŝprenis
ĝin, forkuris kun kuraĝ’.
Ho, kia domaĝ’!**

adaptita el fabloj de Krilov

Lupo kaj ŝafido

**Soife
ŝafid’ al roĵo**

**iras trinki la akvon
klare puran kun ĝojo
sur streta vojo.**

**Subite
jen renkontas ŝi
la lupon tre mizere
kiu serĉas kun mani'
manĝon tie ĉi.**

**Ŝafidon
vidas avide
li kun streĉaj okuloj
kaj paŝas malrapide
al ŝi decide.**

**Per pretekst'
kaj mava rimed'
li volas formanĝi ŝin
por malsata ventr' sen ced'
al la povra pred'.**

**Li krias:
“Vi malplezura
fripono, kial faras
vi la akvon malpura
per kirlo nura.**

**Mi volas
severe pune
deŝiros vian kapon
trinkos sangon subsune
jen ĝuste nune.”**

**La ŝafid’
nun diras pete:
“Se vi lupreg’ permesas,
mi ja trinkos kviete
for de vi prete**

**malsupre
de la rivero.
Certe ne malpurigos
mi akvon kun sincero
kaj kun leĝero.”**

**Li sakras:
“Demono vere
vi ’tas. Kiel aŭdaca
vi kondutas, cetere,
kaj malsincere.**

**Ha, mi jam
memoras klare,
ke vi diris lastjare
krudajn vortojn malŝpare**

kaj tenemare.”

**“Pardonon,
diris kuraĝe
la ŝafido konvinke,
“Ne unujaras aĝe
mi, nur malsaĝe.”**

**“Do certe
ja via frato
faris tion laŭvole.
Ne alvenu kompatato.
Jen via fato!”**

**Ŝi diras,
“Ne fraton havas
mi kaj vere ne kulpas.
Via diro ne pravos,
l’ intenco mavas.”**

**La lupo
ja hurlas krie:
“Malgraŭe vi ja kulpas,
ĉar mi malsatas plie
jam senracie.”**

**Dirante
li ŝin tiris**

**en la densan arbaron
kaj forte ŝin disŝiras
ŝmace elspiras.**

adaptita el fabloj de Krilov

Gruo kaj konko

**ĉina antikva fablo
Sur strando
jen kun valvoj du
malfermitaj la konko
sunumas sin kun plenĝu'
sen ajna enu'.**

**La gruo
gvatas avide
je ŝia franda karno.
Li alflugas rapide
ŝtele inside.**

**Abrupte
per tuja movo
li pinĉas ŝian karnon
firme kun beka ŝovo
— rekta manovro.**

**La konko
tuj fermas bate
siajn du valvojn strikte,**

**la bekon senkompatе
mordas malŝate.**

**La gruo
diras cinike:
“Se ne pluvos hodiaŭ,
nek morgaŭ tutefike,
jen vi panike**

**timtremos
je venanta mort’
pro la manko de akvo,
elĉerpiĝos via fort’
laŭ l’ malbona sort’.”**

**Replikas
la gruo ruze:
“Se mi ne forlasas vin
en du tagoj rifuze
kaj malekskuze,**

**vi mortos
triste mizere
pro manko de manĝaĵo
kaj malsat’ vin infere
molestos vere.”**

Ili du

**ne volas cede
kompromisi unue
sed nur disputas plede
ve, senrime.**

**Fiŝisto
aliras ŝtele
forkaptas ilin ambaŭ.
Kiel agas malbele
ili kverele!**

2015-01-17

La serpento kun piedoj

ĉina antikva fablo
**Antikve
mastro sincere
por danke rekompenci
siajn homojn ofere
donacis vere**

**al ili
botelon da vin',
sed ĝi ja ne sufiĉis
por drinko de ili kvin
je ties deprim'.**

**El ili
deklaris unu:**

**“Ni konkursu per pentrad’.
Ni pentru serpenton, nu,
ek, ne staru plu.**

**Tiu ja
rajtos plengue
drinki l’ tutan botelon,
kiu finos plej frue
ĝin jen senbrue!”**

**Ekpentris
ili surtere
per branĉo kiel penik’.
rapide unu vere
finis fiere.**

**Tujtuje
botelon li prenis,
sed li ne pretis drinki,
ĉar oni branĉon tenis
kaj pentri penis.**

**Li pensis:
estas plibone
fari serpenton bela
per piedoj aldone
al ĝi impone.**

**Alpentris
piedojn al ĝi
li lante kun memfido.
Tiam forkaptis de li
ja botelon ĉi**

**alia
kiu pentris jam,
kaj anoncis: “Mi gajnis,
ĉar la lia ŝajnas ĉam’,
ne serpent’ en sam’.**

**Al serpent’
piedoj mankas.
Ne ekzistas serpento
kun piedoj, mi dankas,
for vi flankas.”**

**Dirinte
tion rapide,
li jen eltrinkis vinon
nek honte nek timide
sed ĝoje ride.**

**La homo,
kiu l’ unua
finpentris la serpenton,
stultis kun voĉ’ senbrua**

kun kapo skua.

Vana atendo

ĉina antikva fablo

Antaŭe

vivis kampulo

avarema kaj pigra,

lerta en menskalkulo,

sed vera mulo.

En kampo

lia jen dika

arbo staris impone,

kun branĉaro fortika

kaj frukt' persika.

Leporo

kuris rapide

kontraŭ la arba trunko

rompis kolon rigide

kaj mortis fride.

La kampul'

gajnis senpene

la leporon kun ĝojo

kiu jen senkatene

ŝprucis plenplene.

**De tiam
li jen demetis
ilojn por kamplaboro
kaj preĝe dion petis
atendi pretis**

**ke lepor'
mortos alia
pro frapo kontraŭ l' arbo.
La ulo senracia
agis senscia**

**tiel ĝis
kampo sovaĝa
fariĝis, velkis plantoj.
Ba! la homo malsaĝa
kun song' miraĝa!**

Fieraĉa rano

ĉina antikva fablo

**La rano
vivadas kun ĝu'
en malprofunda puto
libere kaj ĝoje, nu,
sen ajna enu'.**

**Kun ĝojo
li ekster puto**

**amuzas sin saltadi
kantas kvake sen muti
en sia ludo.**

**Kiam li
ludas ĝis laco,
li revenas en puton
por ripozi en paco
en eta spaco.**

**Sin banas
li kun freŝa sent'
en varma puta akvo
sen ĝeno de forta vent'
je ega kontent'.**

**Li kuŝas
sur mola kotŝlim'
kvazaŭ sur lanuga lit'.
Kiel la hejma intim'
sen ajna deprim'!**

**Li pensas:
mi estas sola
plej feliĉa en la mond',
vivas senĝene fola
kaj libervola.**

**Renkontas
li iafoje
maran grandan testudon
kiu iras survoje,
li diras ĝoje:**

**“Kara vi,
venu al loĝej’
mia por ĝue vidi.
Ĝi estas komforta l’ plej,
bela domo, ej!”**

**La testud’
laŭ lia invit’
volas eniri la puton,
sed enŝovas sin per glit’
jen vane kun ŝvit’.**

**Senhelpe
pro granda maso
li rezignas inviton
haltas en embaraso
pro ne trapaso.**

**La testud’
rakontas al li,
kiel la mar’ aspektas,
kiel vaste kuŝas ĝi**

kun forta magi'.

**Profundas
ĝi sen mezuro,
tre multaj fiŝoj naĝas
tie en akva puro
jen kun plezuro.**

**Influas
ĝin nek inundo
nek grunda trosekego,
sin tenas per profundo
akva abundo.**

**Feliĉe
ni vivas vere
en vasta oceano
senĝene kaj libere
tute fiere.**

**Aŭdinte
ja tion la ran'
sentas grandan hontemon.
Pli vastas ja l' ocean'
ol sia kaban'.**

**Ba, l' rano
scias nurnure**

**pri sia eta spaco
ne pri l' maro nature,
vee murmure.**

Viktoro

Disiĝo

**Vi arbo
estas, kaj mi vent'.
Kvankam ni havas ŝancojn
babili kun gaja sent'
en ofta renkont',**

**kaj amon
inter vi kaj mi
ni deziras sincere
jen brulante de pasi'
sen ajna raci',**

**ni tamen
per eterna am'
kunligiĝi ne povas,
ĉar nur daŭras ĝia flam'
efemere jam.**

**La vento
ĉiame per blov'
flugas tien kaj tien,**

dum arbo sub ĝia ŝov'
foriras sen pov'.

Zhao Jianping

Sentitole

aprile
naivaj floroj
nin hantas jam obstine;
kie audighas ploroj?
jen korangoroj!

Vintro

Perfide,
flora mielo
sopiron ombre tondas.
Vent' blovas kontraŭ velo –
fresta anhelo.

Plaĝo

Sableroj
fajnaj dezerton
englutis. Steloj supre
haltigis jam koncerton
por gajni sperton.

Melankolio

Larmgutoj

**falas sen fino,
odoras harmonie.
Kor' sagas al ruino
de falskulmino.**

Neĝo

**Sin sternas
flokoj arĝentaj
flirtfale; folas knaboj
blankharaj en silentaj
suspiroj ventaj.**

Yujjexing

(Promeno sur Palaca Strato)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ok versoj de
7,33,76,445 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xa,xxa (x=
senrima)

Viktoro

Naturo minacas

**Ho, denove
granda tertrem'
skuas teron forte.
homoj rifuĝas dise
baraktas
malbonsorte.**

**Montoj glitas,
domoj falas.
Surtere malorde
kuŝas ruboj betonaj.
Frida vent'
pikas morde.**

**Kiu povus
ĝin reg-jungi?
Ĉu l' Budho aŭ la Di'?**
**La Naturo rikanas
pri homoj
kun ironi'.**

**La homaro
ne dependas
de ajna religi',
sed savu sin el danĝer'
memfide
kun energi'.**

05-08-2014

Zhuzhici (Bambuoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ
rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Vejdo

Fiŝisto kaj monstro

**Antaŭe ĉiutage
fiŝisto ĵetad-age
kaptis fiŝojn surmare
kaj revenis plenpake.**

**Foje laŭrutine li
ĵetis reton fojojn tri,
sed je lia desapont'
en ret' troviĝis neni'.**

**Je la lasta ret-eltir'
li trovis reton kun mir'
tre peza kiel rokeg'
kuŝas firme sen deŝir'.**

**Li eltiris kun anhel'
la reton kun bronz-botel'
strikte fermita plumbe
per Salomona sigel'.**

**Li ĝin ovris tranĉile,
fum' leviĝis palbrile
el ĝi ĝis alta aer',
kirligis nub-simile.**

**Aperis monstr' minaca
al li trema kaj laca
rikanis kaj kriaĉis
jen per voĉo aŭdaca.**

**Monstro falis subite
sur genuojn, ekscite
petis al la ĉielo:
“Ne min mortigu spite,**

**Ho, reĝo Salomono!
Mi al via ordono
ne plu turnos la dorson
kun obstina opono.”**

**Tuje venis al kompren'
fiŝisto sen ajna pen'
kaj kuraĝe demandis:
“La reĝ' jam en mort-katen'**

**antaŭ jaroj mil ok cent.
Ĉio en nuna moment'
jam tute ŝanĝiĝis, do**

kial vi enas por pent'?"

**“Vi malbeninda ulo,
se vi plu kun ululo
maldece demandas min,
mi tuj faros vin nulo!”**

**La fiŝisto rapide
ĉuis al li malride:
“Kial vi min mortigos?
Ĉu mi agis perfide?”**

**“Ĉar vi min jam savis nu,
krom vi, al neniu plu
mi rakontu la jenon:
antaŭe kun granda ĝu’**

**mi ja per malbona far’
kaj ribela kontraŭstar’
ne obeis al la reĝ’,
li do pro mia erar’**

**enmetis min kruele
en botelon forpele,
ĵetis ĝin en la maron
por fermi min karcere.**

Enmare cent jarojn mi

**Loĝadis, kaj pensis pri
Mia saviĝ' el botel'
Kaj forlas' de tie ĉi.**

**Se iu min sen motiv'
savos, mi dum lia viv'
faros lin pompe riĉa
kun lumbrila perspektiv'.**

**Cent jaroj jam pasis, sed
neniu venis en pret'
elsavi min favore
eĉ per malsaĝa rimed'.**

**Pasis kvar cent jaroj pli
neniu venis al mi
liberigi min elen
kun malgranda simpati'.**

**Tiam mi pensis ĵure:
kiu savas sekure
min dum ĉi tiu horo,
mi permesas lin nure**

**elekti l' vojon de mort'.
Nun alvenas via sort',
vi elektu laŭplaĉe
kiel morti en bonord'!"**

**la fiŝisto silente
ekpensis dummomente
kiel ja elturniĝi,
kaj parolis talente:**

**“Jes, mi mortos laŭvole.
La boteleto sole
kiel vian korpegon
entenas ja strangole?”**

**la monstro tre malsaĝe
enŝovis sin kuraĝe
en botelon tujtuje
volvis sin sendamaĝe.**

**La fiŝisto senmorne
tuj ŝtopis nekonsterne
la botelon, ĵetis ĝin
en maron por eterne.**

adaptita el Mil kaj unu noktoj

13-08-2014

Cikloj

Guozhu

Akrostika rimgratulo

al Gerrit Berveling

Gratulon sinceran / mi sendas al kara
erudit' sepdek-jara,
rime kun sento / familiara.
Revenas la dat' por / vi neordinara,
impona pro elstara
tempo kun ago / meritofara.
Brilas verda stelo / kaj en Akademio,
en Monato, / Nederlando, / asocio.
Redaktoro / kun senlaca / energio.
Verkisto fama, / tradukisto / de bela / ario
en Antologio
Latina / poezio.
Influas vi / per beletra/ galerio.
Nun invitas / nin aprezi / ĝis ebrio.
Gratulon al vi / en nasktaga / ovacio!

2014-04-01

Noto:

**La unua strofo estas laŭ ĉinesko Linjiang-xian (Feo ĉe Rivero),
unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj de du strofoj po 5 versoj de
66,7,55 silaboj(kelkfoje kun variantoj), laŭ rimarangô x,a,a,x,a
(x=senrime)*

***La dua strofo estas laŭ ĉinesko Shuilongyin (Akva Drako),*

*unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po 12 versoj de
67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj, laŭ rimarangô
xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)*